

TeKu 159 - Januaro 2022

Terminara Kuirejo:



Karaj gekolegoj,

la lastdatan Terminaran Kurieron 158 vi ricevis antaŭ konsiderinde longa tempo – enmeze de la

pandemio kaj esperante pri baldaŭa reveno al cirkonstancoj permesantaj realvivan kunvenon de nia rondo kadre de kongreso kian ni konis kaj ŝatis ĝin antaŭe. Vi mem observis kio okazis (kaj kio ne okazis) en tiu rilato. Ne malsimila estas la sorto de la terminologia rondo laboranta en kaj kun UIC. Ties kunidoj okazas – sed en virtualaj kunvenejoj kun longaj anglalingvaj referaĵoj pri naciaj datumbankaj projektoj, pri laborplanoj kaj novordigo de prioritatoj.

La terminologia laboro ekster tiuj kunvenoj koncernas la glosarojn, kiujn kompilas la redaktistoj de la IRS-normfolioj. Vi memoras pri la terkonstrua IRS 70719 – la terkonstruaĵoj kaj traksidejaj tavoloj por fervojlinioj.

Aldoniĝis en la listo de farendajoj intertempe du pliaj IRS-oj, same origine anglalingvaj kaj sen nacilingvaj referencoj. Sekvante la sugeston dum traktado de la terminoj el TeKu 158 mi vicigas ne nur la originajn anglalingvajn terminojn sed ankaŭ la anglajn difinojn. Eventuale ili helpas diskuti la terminojn kun fakuloj konataj de vi.

Guido Brandenburg

IRS 90930 kaj 90940 „Ciferecigo, datumoj, aperantaj novigoj“



„Fremda“ trajno sur linio de la Germana Fervojo
(Foto: Störfix, WikiMedia)

IRS 90930 okupiĝas pri „diversaĵoj – energifakturado – fakturado de trakcia energio kaj datuminterŝanĝo“.

IRS 90940 pritraktas „datuminterŝanĝon kun DAS (Driver Advisory System = konsilsistemo porkondukista) konforme al la SFERA-protokolo (Smart communications For Efficient Rail Activities = inteligenta interkomunikado por efikaj reltrafikaj aktivecoj).

Kial necesas tiuj normfolioj?

Unuflanke la tuteŭropa liberigo de la fervojtrafika merkato levas la demandon kiel mezuri kaj fakturi al reltrafika entrepreno de ties trajnoj konsumitan trakcian energion.

Aliflanke okazis teknologia evoluo en la kampo de racia energimastrumado kiu povas helpi ŝpare uzi trakcian energion enkadrigite de horaro kaj varia rapidoprofilo laŭ la linio.

Termindecidoj el TeKu 158

Term ID		Term ID	
12972	plenigaĵo rembura	12994	trakbazo grajna
12973	ŝotro	12995	tavolo subbalasta grajna
12974	tavolo balasta	12996	grundo fundamenta nestabila
12975	trako balastita	12997	tavolo frostizola
12976	trako sen balasto	12998	tavolo
12977	tavolo subbalasta bitumeca	13000	traktado perŝarĝa
12978	kovraĵo	13001-12	trakbazo preparita
12979	tranĉprofilo	13001-13	tavolo forma
12980	kompaktigo dinamika	13002	trakplatformo
12981	terkonstruaĵo	13003	grundsinkado
12982	terkonstruado	13004	trakbazo stabilige preparita
12983	taluso	13005	tavolo subbalasta
12984	bazo de taluso	13006	trakbazo
12985	kerno de taluso	13006-1	platformo terkonstruaĵa
12986	ŝultro de taluso	13007	strukturaĵo apoga
12987	supra parto de taluso	13008	traksideo
12988	tavolo filtra	13009	trakokomponento
12989	tavolo mergita	13010	trakrigideco
12990	grundo fundamenta	13011	trakstrukturaĵo
12991	tavolo frostoprotekta	13012	trakosubstrukturaĵo
12992	grundo frostosensiva	13013	trakosuperstrukturaĵo
12993	teksaĵo terstabiliga	13014	zono malseka



Taskoj el IRS 90930

13145	Process for producing proof of compliance with requirements coming from legal or commercial documents.	Procedo celanta pruvi konformecon al postuloj el leĝaj aŭ komercaj dokumentoj.
	conformity assessment	ekzameno konformecca
13146	Document declaring successful conformity assessment of, for instance, Energy Metering Data or a Data Collecting System.	Dokumento deklaranta sukcesan konformecon ekzamenon, por ekz. energimezuraj datumoj aŭ datumkolekta sistemo.
	conformity assessment certificate	konformecdiplomo
13147	Group of vehicles that are not separated during normal operation.	Grupo de veturiloj kiuj ne estas apartigitaj dum normala funkciado.
	consist ¹⁾	konsisto (trajnkompleto?)
13148	Commercial metering data suitable for energy billing, presenting the energy consumption of a traction unit measured by its Energy Measurement System and compliant with LOC&PAS TSI <i>(Technical Specification for Interoperability Locomotives and passenger rolling stock).</i>	Komerciaj mezurdatumoj konvenaj por energifakturado, montrantaj energikonsumon de trakciilo mezurita de ties energimezura sistemo konforma al LOC&PAS TSI <i>(Teknika specifo por intersistema funkcio lokomotivoj kaj pasaĝervagonoj).</i>
	compiled energy billing data (CEBD)	datumoj energifakturaj kompilitaj (CEBD)
13149	Identification number of an Energy Measurement System on a railway vehicle.	Identiga numero de energimezura sistemo en fervoja veturilo.
	consumption point ID	identigilo konsumpunkta
13150	Official global time/date reference source, including a defined method for declaring the related local time anywhere on earth.	Oficiala tutmonda tempodata referenco inkludanta difinitan metodon por rilate deklari lokan tempon ie ajn sur la tero.
	coordinated universal time (UTC)	tempo universale kunordigita (UTC)
13151	On-ground service collecting the compiled energy billing data from an Energy Measurement System.	Lokligita servo kolektanta la kompilitajn energifakturajn datumojn.
	data collecting system	sistemo datumkolekta

13152	Natural or legal person responsible for operating, ensuring the maintenance of and, if necessary, developing the distribution system in a given area and, where applicable, its interconnections with other systems; and for ensuring the long-term ability of the system to meet reasonable demands for the distribution of electricity.	Natura aŭ jura persono respondeca por funkcio, prizorgado kaj eventuale vastigo de distribua reto en difinita regiono kaj eventuale ĝiaj interligoj kun aliaj retoj cele certigi la pordaŭran kapablon de la reto kovri akcepteblajn postulojn pri distribuo de elektra energio.
	distribution system operator (DSO)	prizorganto distribureta (DSO)
13153	On-board system which measures the energy use of the railway vehicle and produces Energy Metering Data	Enveturila sistemo mezuranta la energikonsumon de fervoja veturilo kaj produktas energimezurajn datumojn.
	energy measurement system (EMS)	sistemo energimezura (EMS)
13154	Commercial metering data suitable for energy billing.	Komercaj mezurdatumoj konvenaj por energifakturado.
	energy metering data	datumoj energimezuraj
13155	Data showing a consumer's official energy consumption in a settlement period and location.	Datumoj montrantaj la oficialan energikonsumon de kliento en difinita periodo kaj loko.
	energy use data	datumoj energikonsumaj
13156	Entity in charge of the maintenance of a vehicle and registered as such in a vehicle register.	Instanco taskita per la vartado de veturilo kaj tiel registrita en veturilregistro.
	entity in charge of maintenance (ECM)	instanco taskita per vartado (ECM)
13157	Unique 12-digit identification number of the railway vehicle.	Unika 12-cifera identiga numero de fervoja veturilo.
	european vehicle number (EVN)	veturilnumero eŭropa (EVN)
13158	Electricity transport system which can deliver electrical energy directly to/from a traction unit.	Elektra reto kiu povas transporti elektran energion rekte al/de trakciilo.
	traction electricity grid	reto trakcielektra
13159	Potential to schedule train paths requested for an element of infrastructure for a certain period.	Resursoj por plani itinerojn tra infrastruktura elemento en certa periodo.
	infrastructure capacity	kapacito infrastruktura

13160	Data describing the geographical position of the traction unit.	Datumoj priskribantaj la geografian pozicion de la trakciilo.
	location data	datumoj poziciaj
13161	Statement which sets out in detail the general rules, deadlines, procedures and criteria for charging and capacity-allocation schemes, including such other information as is required to enable applications for infrastructure capacity	Deklaro prezentanta detale la ĝeneralajn regulojn, templimojn, procedurojn kaj kriteriojn por asigni kapaciton kaj fakturon inkluzive aliajn informojn necesajn por mendo de trakvoja kapacito.
	network statement	retdeklaro
13162	Organisation notified by an EU country to be responsible for conformity assessment activities, including calibration, testing, certification and inspection.	Organizo nomumita de EU-lando por respondeci pri konformeceksamenaj taskoj, inkluzive de kalibrado, testado, atestado kaj inspektado.
	notified body	nomumita instanco
13163	Code in the Energy Metering Data indicating the quality level of a related value.	Kodo en la energiemezurata datumaro indikanta la kvalitan nivelon de respektiva valoro.
	quality code	kvalita kodo
13164	Metering data similar to the Compiled Energy Billing Data but which can contain more types of data and can have a different measurement period.	Mezuraj datumoj similaj al kompilitaj energifakturaj datumoj, kiuj tamen povas enhavi pliajn datumtipojn kaj koncerni alian mezurperiodon.
	reading ¹⁾	datumlegajo, mezurprotokolo
13165	Measurement period of time for which a single set of Energy Metering Data is produced.	Mezurperiodo por kiu estas produktata unusola grupo de energiemezuraj datumoj.
	time period ¹⁾	tempospaco, mezurperiodo
13166	Time period of 5 minutes for which a single Compiled Energy Billing Data is produced.	Tempospaco de 5 minutoj por kiu estas produktita unu sola kompilita energifaktura datumrikordo.
	time reference period (TRP)	referenca tempospaco (TRP)
13167	Traction electricity grid considered according to the electricity type which feeds the traction unit with which it is in contact.	Trakcikurenta reto rigardata laŭ kurentospeco nutranta la trakciilon kontaktitan.
	traction system ¹⁾	trakcistemo (?)

13168	Infrastructure capacity needed to run a train between two places over a given period.	Infrastruktura kapacito bezonata por movi trajnon inter du lokoj en difinita tempospaco.
	train path ¹⁾	trajnvojo (?)
13169	Series of traction units which have the same technical specifications.	Tipo de trakciiloj kiuj havas la samajn teknikajn specifojn.
	traction unit type (TUT)	Trakiiltipo (TUT)
13170	Natural or legal person responsible for operating, ensuring the maintenance of and, if necessary, developing the transmission system in a given area and, where applicable, its interconnections with other systems; and for ensuring the long-term ability of the system to meet reasonable demands for the transmission of electricity.	Natura aŭ jura persono respondeca por funkcio, prizorgado kaj eventuale vastigo de distribua reto en difinita regiono kaj eventuale ĝiaj interligoj kun aliaj retoj cele certigi la pordaŭran kapablon de la reto kovri akcepteblajn postulojn pri transsendo de elektra energio.
	transmission system operator (TSO)	prizorganto transsendoreta (TSO)
13171	Natural or legal person that, being the owner of a vehicle or having the right to use it, exploits the vehicle as a means of transport and is registered as such in a vehicle register.	Natura aŭ jura persono, estanta posedanto de veturilo aŭ havanto de uzorajto, kiu ekspluatas la veturilon kiel transportrimedon kaj tiel estas registrita en veturila registro.
	vehicle keeper	veturilproprietulo

Taskoj el IRS 90940


13172	Solution to help trains drive optimally in their time slots by calculating the ideal driving profile which fulfils the transport plan while optimising the journey according to different criteria, such as reduced energy consumption.	Helpinstalaĵo celanta veturigi trajnojn optimume en siaj horaroj per kalkulo de la ideala veturprofilo kiu plenumas la transportplanon dume optimumigante la vojaĝon laŭ malsamaj kriterioj, kiel reduktita energikonsumo.
	driver advisory system (DAS)	konsilsistemo porkondukista (DAS)
13173	Driver advisory system connected to the traffic management system.	Konsilsistemo porkondukista konektita kun trafikdirekta sistemo.
	connected driver advisory system (C-DAS)	konsilsistemo porkondukista konektita (C-DAS)

13174	Technical specification to handle data exchange with and to facilitate the use of driver advisory systems on international journeys and to enable their connection with traffic management systems.	Teknika specifo por pritrakti datuminterŝanĝon kun la konsilsistemo porkondukista dum limtranspaŝaj veturoj kaj ebligi la konekton kun la trafikdirektaj sistemoj.
	SFERA protocol (Smart communications For Efficient Rail Activities)	SFERA-protokolo (inteligenta interkomunikado por efikaj reltrafikaj aktivecoj)
13175	Set of advice presented to the driver during the journey to reach an optimised train run based on real-time data, the train path envelope and all other applicable constraints.	Bazo de konsiloj prezentitaj al kondukisto dum la veturo por atingi optimumigitan trajnan kuron bazitan sur aktualaj datumoj, la trajnvoja envelope kaj ĉiuj aliaj aplikendaj restriktioj.
	driving profile	veturprofilo
13176	Worldwide position, time and velocity radio determination system comprising space, ground and user segments	Tutmonda radiofonia sistemo determinanta pozicion, tempon kaj rapidon, kiu konsistas el spacaj, surteraj kaj ĉeaplikantaj partoj.
	global navigation satellite system	tutmonda navigadsatelita sistemo
13177	Automation level of train operation in which a train can be operated, resulting from sharing responsibility for given basic functions of train operation between operations staff and system.	Aŭtomatiga nivelo de trajnfunkciado je kiu trajno povas esti funkciigata, rezultanta el divido de respondeco pri certaj bazaj operacioj en trajnfunkciado inter funkcia personaro kaj sistemo.
	grade of automation (GoA)	aŭtomatiga nivelo (GoA)
13178	Scheduled movement of a vehicle along a single route.	Laŭplana moviĝo de veturilo laŭlonge de unusola itinero.
	journey ¹⁾	vojaĝo (?)
13179	Set of data which includes the list of pining points, references to segment profiles and train characteristics, and temporary changes to the infrastructure (e.g. temporary speed restrictions).	Bazo de datumoj, kiu inkludas la liston de horarpunktoj, referencojn al sekciaj profiloj kaj trajnaj karakterizaĵoj kaj dumtempaj ŝanĝoj en la infrastrukturo (ekz. nedaŭraj rapidlimigejoj).
	journey profile (JP)	vojaĝprofilo (JP)
13180	List or plan showing turns of duty or leave for individuals, groups or physical resources in an organisation	Listo aŭ plano montranta deĵortempojn aŭ feriojn de unuopaj

		personoj aŭ grupoj aŭ de fizikaj resursoj de organizaĵo.
	roster	deĵorplano
13181	Set of mostly static infrastructure data required by the Driver Advisory System on board (DAS-OB) to compute the Operational Speed Profile.	Bazo de plej ofte daŭraj infrastrukturaj datumoj postulataj de la porkondukista konsilsistemo en la kondukejo (<i>DAS-OB</i>) celanta komputi la funkciajn rapidecprofilon.
	segment profile (SP)	sekciprofilo (SP)
13182	Location identified in the schedule of a train for which a specific time is set.	Loko identigita en la trajnhoraro ligita al difinita tempo.
	timing point (TP)	horarpunkto (TP)
13183	Interval of time within which a train is requested to stop, start or pass at a location.	Tempa intervalo dum kiu trajno ricevas ordonon halti, ekveturi aŭ pasi je certa loko.
	time window ¹⁾	tempospaco (?)
13184	Non-safety-critical system which advises the control command and signalling system based on the current traffic situation and other internal or external information in order to improve the level of service.	Sistemo ne sekurecdecida, kiu konsilas al la trajnsekuriga kaj signala sistemo surbaze de la aktuala trafiksituaĵo kaj aliaj internaj kaj eksteraj informoj cele plibonigi la servokvaliton.
	traffic management system (TMS)	trafikdirekta sistemo (TMS)
13185	Set of mostly static train data required by the Driver Advisory System on board (DAS-OB) to compute the Operational Speed Profile.	Bazo de plej ofte daŭraj trajndatumoj postulataj de la porkondukista konsilsistemo en la kondukejo (<i>DAS-OB</i>) celanta komputi la funkciajn rapidecprofilon.
	train characteristics (TC)	trajnkarakterizaĵoj (TC)
13186	Set of data specifying, per location, a time window and, optionally, minimum and maximum speeds.	Aro de datumoj specifantaj laŭpozicie tempospacojn kaj laŭdeziro minimuman kaj maksimuman rapidon.
	train path envelope (TPE)	envelopo trajnvoja (TPE)
13187	Point on the railway network for which the exact location is known based on the geographic coordinates and the distance from the start of a segment.	Loko en la fervoja reto kies preciza pozicio estas konata per la geografiaj koordinatoj (el satelita loktrova sistemo) kaj la distanco al la komenco de sekcio.
	virtual balise ²⁾	virtuala balizo (?)

piednotoj:

- 1) La normfolioj parte malvastigas la difinon de ĝenerale aplikataj nocioj al speciala apliko en kunteksto de la specifa normfolio aŭ eĉ donas al ili diferencajn signifojn. La UIC-terminologoj ne jam decidis akcepti tiujn novajn homonimojn.
- 2) La verkintoj de la IRS estas petataj pri trovo de pli taŭga termino.



La DAS-ekrano montras al la kondukisto la rekomendindan veturprofilon kalkulitan el momenta pozicio, linia topografio, pezo de la trajnkompleto kaj dinamikaj datumoj. Tiel ĝi helpas ŝpari trakan energion.

(ekzempla bildo: Knorr-Bremse)

Lasta noto:

La normfolioj inflacie enkondukas akronimojn devenantajn de anglalingvaj terminoj (ekz. "DAS"). Tiuj akronimoj sendube aperos en tiu formo ankaŭ en alilingvaj aŭ tradukitaj tekstoj kaj estos uzataj kiel kvazaŭ internaciaj terminoj. Ĉar tradukita akronimo (ekz. "DAS"="KP") ne havas rekonan utilon, mi ankaŭ en la esperanta versio citas ĝin laŭ la origino.

Ankaŭ ĉifoje la kampo de la pritraktitaj nocioj ne permesas ĉerpi el propraj profesiaj spertoj. Nun la kaŭzo ne estis la diferenca fako sed la entuta noveco de la kampoj en la fervoja medio. Ne necesis precize fakturi energiforuzon kiam (kun malmultaj esceptoj) la trakciiloj ankoraŭ apartenis al la propra entrepreno. Kaj por la kumulo de dinamikaj informoj permesantaj konkludojn pri energiŝpara veturado mankis sufiĉe rapida kaj potenca informteknologio. Se mankas al ni la specifaj fakuloj – tion mi anticipas – ni bezonas sufiĉan fantazon por imagi la funkcion de tiuj sistemoj.

La spertoj de la pasintjara retkonferenca kunveno de la Terminara Sekcio dum kiu ni diskutis la IRS 70719 estis bonaj kaj kuraĝigaj. Tial mi baldaŭ petos vin decidi pri konvena dato por nova Zoom-kunveno.

Restu sanaj laŭeble

Guido Brandenburg
(Sekretario Terminara Sekcio)



Faka Komisiono de IFEF:		Terminara Sekcio:	
Gvidanto:	momente neokupita	Sekretario:	Guido Brandenburg
Adreso:		Adreso:	Görlitzer Straße 17 DE-48317 Drensteinfurt
Telefono:		Telefono:	+049 2508 9107
Retadreso:		Retadreso:	ts@ifef.net